

1600–1999 paŝoj – 11 baladoj

& Filino de Torkil:.....	493
& Petro sinjor' kaj Elinborg':.....	497
& Sir Patrick Spens:	502
& La portreto:	505
& Olav Rajdistrozo:.....	509
& Ĉielarka fabelo:	513
& Bresta balado:	516
& La fantomo de la reto:	522
& Mvajnun kaj Nandar:.....	526
& Fablo pri gilotin-ŝraŭbeto:	531
& La plej granda kulpulo:.....	534

& Filino de Torkil:

< Rekante 19 el 27 batoj por strofo, entute 1620 paŝoj dum 16 minutoj. Norda Kantaro #4451. Notis H. C. Lyngbye laŭ manuskripto de Schrøter (Færøiske Qvæder, 1822), krom strofoj '6 kaj '52 laŭ A.C. Evensen. El feroa tradukis Martin Strid (2016). Duoble tradukiĝis strofoj '4, '21, '26, '27, '38, '41, '44 kaj '49. Klarigoj (*): '1 Torkil estas viruĉa nomo. ; Pli trafa traduko estus "Bone min zorgis" aŭ "Bone al mi ordigis". '14 Iranto = ĉevalo. '17 La buŝo de la ĉevalo. '34 Asa estas virina nomo.>

(#Melodio:

<1,7:27>

(oso /sodo doododo rere so;so somi; sososo soso fami relmi; fa mimi re do; rere rere rerere soso somi; sososo soso faamimi remi; fa mimi re do)×60)+

(&Strofoj:

'1 /Torkil* havas filinojn du,
(×: – **ja danci** –) longe matene
dormas plu. (×: – **Bone min**
ŝancis*, ; **jen mi volas**
plankon antaŭen danci, ;
kvankam vi mian vivon
minacis, ; **bone min ŝancis**.)

'2 Dorme ili trankvilis, ĝis
la liton suno brilis.

'3 Ili longe dorme kuŝas,
ĝis la sunbrilo liton tuŝas.

'4a Torkil iras kabanon,
.....vekas filinon bonan.

'4b Torkil iras al ĉambro,
.....vekas filinojn ambaŭ.

'5 "Ekstaru, Katrin, mia filin',
..... preĝejulo atendas vin."

'6 "Se li ne atentos, rajde
lin forsendu!"

'7 Katrin sur lito sidas,
longe ŝi vestiĝas.

'8 Ŝi surmetis silkan robon,
..... naŭjunulinan manlaboron.
.....

'9 Bluan mantelon sur ĝin
supro, orfadeno en ĉiu
kudro.

'10 Katrin sursidas litan
stumpon, metas al si
skarlatajn ŝtrumpojn.

- '11 Skarlata ŝtrumpo kaj bona ŝu' blankaj manoj ĉe ŝultroj du.
- '12 Katrin orkombilon prenas, kombas hararon kun silka rimeno.
- '13 Ŝi kombas hararon kun silko eta, oran kronon ŝi supre metas.
- '14 Katrin ĉevalejon iras, grizan iranton* ŝi elstiras.
- '15 Elstiras ŝi unun, elstiras ŝi duujn, plej bonan ŝi selon metis sure.
- '16 Soldato tie ne ĉeestas, metas mem Katrin bridilon sur beston.
- '17 Soldato tie ne pretas, mem Katrin bridilon en buŝon* metas.
- '18 Rajde ŝi laŭ strato spuris, bruis dum ŝia iranto kuris.
- '19 Al suda deklivo venis ŝi, ŝin renkontis paŝtistoj tri.
- '20 Laŭ vojo ŝi venis iom plu, ŝin renkontis paŝtistoj du.
- '21a Mezen ŝi venis en tero komuna, ŝin renkontis paŝtisto unu.
- '21b Mezen ŝi venis en herbo mola, ŝin renkontis paŝtisto sola.
- '22 "Aŭdu, Katrin, parolas mi vin, estu vi mia vespera virin'?"
- '23 "Prefere mi lasos vivon mian, ol esti vespera virino via."
- '24 "Ĉu volas vi lasi vivon vian, ol esti vespera virino mia?"
- '25 Paŝtisto glavon sian skuis, li fendis Katrinon en pecojn du.
- '26a Kie ŝian sangon ŝmiris, eklumiĝis al ĉiuj iroj.
- '26b Kie ŝian sangon difektis, eklumiĝis al ĉiuj direktoj.
- '27a Kie kuŝis ŝia kapo, fonto saniga teron ekfrapos.
- '27b Kie ŝia kapo kuŝis, fonto saniga el tero duŝis.
- '28 Kie ŝia korpo kuŝis preĝejo stariĝis kaj sur ĝi kruco
- '29 Paŝtisto hejmen iris al bien' ekstere al li staris Torkil jen
- '30 "Aŭdu, paŝtisto, mi diras al vi, ĉu ne vidis Katrinon, filinon de mi?"

'31 "Jes ja, ŝin mi vidis vere,
..... en Maria preĝejo ŝi estis
hieraŭ."

'32 "Torkil, Torkil, mi pruntu
domon malsanega mi estas
homo!"

'33 "Pretas ja domo pura,
eĉ se estus paŝtistoj pluraj.

'34 Asa* eta, lumigu
kandelon, paŝtisto jen al
lito celos!"

'35 Asa la liton kabanon,
pretigas por la knabo malsana.
.....

'36 "Asa eta, dormu ĉe mi,
silkan robon mi donos al vi!"
.....

'37 "Unue mi silkan robon
vidu, poste mi ĉe vi
kuŝiĝu."

'38a Kiam ŝi silkan robon
spektas, fratinsignon
rekonas rektan.

'38b Kiam ŝi silkan robon
vidis, fratinsigno lin
perfidis.

'39 "Asa eta, dormu ĉe mi,
bluan mantelon mi donos al
vi!"

'40 "Unue mi bluan mantelon
vidu, poste mi ĉe vi
kuŝiĝu."

'41a Kiam ŝi bluan mantelon
spektas, fratinsignon
rekonas rektan.

'41b Kiam ŝi bluan mantelon
vidis, fratinsigno lin
perfidis.

'42 "Asa eta, dormu ĉe mi,
oran kronon mi donos al vi!"
.....

'43 "Unue mi oran kronon
vidu, poste mi ĉe vi
kuŝiĝu."

'44a Kiam ŝi oran kronon
spektas, fratinsignon
rekonas rektan.

'44b Kiam ŝi oran kronon
vidis, fratinsigno lin
perfidis.

'45 Asa ĵetis al sojlo pordon:
..... "Havu paŝtisto bonnokton
en ordo."

'46 Asa iras al patro sia:
"Murdis paŝtisto filinon vian."
.....

'47 "Kiu aŭdacas min tion
mesaĝi, aŭ kiu la faron fari
kuraĝis?"

'48 "Mi aŭdacas vin tion
mesaĝi, Paŝtisto la faron
fari kuraĝis."

'49a Torkil vokas al du
fraŭloj: "Iru al maro, faru
fajron."

'49b Torkil vokas al fraŭloj
du: "Ĉe maro fajron
bruligu nun.

'50 Iru al maro, faru fajron,
..... tie paŝtisto brulon
salajros."

'51 Estis en la nova mateno,
..... brulis paŝtisto sur verda
ebeno.

'52 Estis en matena pleno,
brulis paŝtisto sur verda
tereno.)

& Petro sinjor' kaj Elinborg':

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 1624 paŝoj dum 17 minutoj. Norda Kantaro #4444. Notis Schrøter. El feroa tradukis Martin Strid (2016). Duoble tradukiĝis strofoj '3, '26, '34 kaj '36. Klarigoj (*): '21 Juta kavalirparolo: ĝentilula dialekto de Jutlando. '35 Pasko: festo en fino de marto aŭ aprilo ; Sankta Martena tago: festo en komenco de oktobro.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

/LaaLaLa LaMi SiSi La; LaLaTi doTi LaSo; TiTi TiTi TiTi dodo;
doTi doTi LaSo;

(Rekantaĵo: Ti TiTi La SolFa Mi LaTi do do;Ti Ti TiTi Mi LaTi
doTi La a)

)×56)+

(&Strofoj:

'1 /Petro sinjor' kaj Elinborg' ;
estis infanoj junaj, ; sian amon
metis kunen, ; multajn sorto
punas.

(×: **Nun emas mi e2n dancon
jam iri ; dum rozoj, lilioj
kreskadas tre.)**

'2 Petro sinjor' kaj Elinborg' ;
estis infanoj riĉaj, ; sian amon
metis kunen, ; multajn sorto
sufiĉas.

'3a Metis li manojn sur ŝian
kolon, ; al ŝi milde parolas: ;
"Kiom longe vi, Elinborg', ;
fianĉino, atendi min volas?"

.....

'3b Metis li manojn sur ŝian
kolon, ; kise ŝin kareas: ;
"Kiom longe vi, Elinborg', ;
fianĉino, atendi promesas?"

.....

'4 "Sep vintrojn atendos mi ;
sen konsento fratula, ; ne
edzigos vivan viron ; dum en
mi vivo brulas.

'5 Sep vintrojn atendos mi ;
kontraŭ fratula ŝato, ; ne
edzigos vivan viron ; eĉ se
min reĝo svatos."

'6 Petro sinjoro paŝas ; en la
ŝipan sinon ; "Mi
malpermesas al ĉiu viro ; mian
fianĉinon!"

'7 Petro sinjoro paŝas ; ĉe la
ŝipa bivako ; "Mi
malpermesas al ĉiu viro ;
dormi sur ŝia brako!"

'8 Sep vintroj forpasis jam, ;
Elin eksopiras, ; ŝultras sur sin
bluan mantelon, ; al fenestro
iras.

'9 Elin' ĉe fenestro staras, ;
elrigardas vaston, ; bela estis
la ŝipo, ; sur maro ŝi vidas
maston.

'10 "Bone konas mi la velojn, ;
bone mi konas buspritojn, ;
bone konas mi la ŝipon, ; por
Petro sinjoro glitas."

'11 Elin iras al bordo
malsupren, ; for tabulojn
malŝlosis, ; bela estis la ŝipo ;
kiu ĉe kajo flosis.

'12 "Aŭdu vi, riĉaj
komercistoj, ; kion vi havas
por vendi?" ; "Ni havas robojn
kaj ruĝan skarlaton, ; plej
bonajn vi povas mendi."

'13 "Ne pri roboj mi zorgas, ;
nek pri ruĝa skarlaton, ; mi
malĝojas ĝismorten, ; estas
fremduje frato"

'14 "Li ne estas via frato, ; ĉar
vi estas paro. ; Li en Danujo
loĝas ; regas burĝon ĉe maro.
.....

'15 Li en Danujo loĝas, ; je
nom' riĉa Petro sinjoro, ; li
fianĉas al dana virino, ; ne kiel
vi ŝi floras."

'16 Elin iras de bordo supren, ;
volvas sin en felo, ; iras ŝi en
altan halon, ; sian fraton
Ejrikon celas.

'17 "Bone vi sidas, Ejrik,
frato, ; jen min aŭskultu, kara:
; Ĉu vi estos mia stiristo ;
trans la sala maro?"

'18 "Vi eksidu ĉe mia tablo, ;
kun mi hodiaŭ drinku! ;
Fraŭlina moro ne estas veli ;
sur maro, laŭ mia konvinko."
.....

'19 Elin sin turnas de halo
eksteren, ; pleje ŝi koleris ;
"Dio ne lasu min vivi tagon ;
pli al vi petojn oferi."

'20 Prenas ĉiujn fraŭlinojn ŝi, ;
kunen sidigas en rondo, ; ŝi
elprenas tondilon arĝentan ;
hararojn ĉirkaŭtondas.

'21 Prenas ĉiujn fraŭlinojn ŝi, ;
hararojn tondas ĉe koloj ;
poste instruas al ili ĉiuj ; jutan
kavalirparolon*.

'22 Prenas ĉiujn fraŭlinojn ŝi, ;
faras kavalirajn vestojn, ; iras
ili malsupren al bordo ; kie ŝi
jam estis.

'23 Ejrik al la bordo
malsupren ; saman tagon iris : ;
"Volas mi trans sala maro ;
vian ŝipon stiri."

'24 "Ne malpli mi vetas ol ;
mian arĝentoringon: ; ke neniun
vira homo ; ŝipan internon
atingos!

'25 Ne malpli mi vetas ol ;
arĝentan krucon mian: ; ke
neniun vira homo ; venos sur
ŝipon nian!

'26a Ne malpli mi vetas ol ;
mian arĝentoŝnuron: ; ke
neniun vira homo ; ŝipan
tabulon suros!

'26b Ne malpli mi vetas ol ;
mian arĝentoĉenon: ; ke neniun
vira homo ; sur la ŝipon
venos!"

'27 Tamen estis Elinborg', ;
brave brilas trema ; kaj ĉe
rudro stari iras ; kaj servistinoj
ekremas.

'28 Sur malhelan maron
elremis ; dum monatoj du, ;
neniun veteron havis ili ; por
vidi teron de pruo.

'29 Sur malhelan maron drivis
; en monato tria, ; neniun
veteron havis ili ; por vidi
teron ian.

'30 Neniun veteron havis ili ;
por vidi teron de pruo, ; antaŭ
alta grundagreso ; falis la
ondoĵ bluaj.

'31 Diris mastrino Elinborg' ;
per la vorto unua: ; "Ni prefere
promesu almozon ; por vidi
teron de pruo!"

'32 Kelkaj promesis unun, ;
kelkaj promesis duujn, ; tiam
levis nebulo sin, ; ili vidis
teron de pruo.

'33 Ĉiuj promesis unun kaj
duujn, ; Elin triujn promesis ;
tiam sin levis la nebulo, ; kaj
teron okuloj karesis.

'34a Frue estis en mateno, ;
ruĝas monton suno, ; tiam
levis nebulo sin, ; ĉe
Petrosinjora laguno.

'34b Frue estis en mateno, ;
suno ruĝas valon, ; tiam levis
nebulo sin, ; ĉe Petrosinjora
halo.

'35 Paskosemajnan la
vendredon* ; ili sur maron
ekvagis, ; kaj ne venis al tero
antaŭ ; sankta Martena tago*.

.....

'36a Ĵetas ili sian ankron ; sur
blankan sablan fundon, ; paŝas
unue Elinborg', ; metas piedon
sur grundon.

'36b Ĵetas ili sian ankron ; sur
blankan sablobedon, ; paŝas
unue Elinborg', ; sur teron
metas piedon.

'37 Meze en ĝardeno ŝi ;
surŝultrigas felon, ; veste preta
tiel iras, ; altan halon celas.

.....

'38 "Sana vi sidas, Petro
sinjor', ; ĉe larĝa tablo! ; Ĉu
ĝentilaj fraŭloj tiel ; vorton
teni kapablas?

'39 "Bone vi sidas, Petro
sinjor' ; kaj mastrino dana! ;
Ĉu ĝentilaj fraŭloj tiel ; tenas
promeson manan?

'40 Petro sinjoro de tablo
turniĝas, ; arĝentan poton
tenas: ; "Dio du okulojn benu,
; pri vi memoro plenas!

'41 Aŭdu, mastrino Inĝibjorg',
; al mi ne koleru, ; dum mi
sekvos nevon mian ; en tritaga
konkero.

'42 Dum mi sekvos nevon
mian ; en tritaga konkero, ; se
mi ne venos ĝis la kvara, ; ne
min atendu espere!"

'43 Respondis mastrino
Inĝibjorg', ; larmo vange
venas: ; "Li ne estas via nevo,
; tute mi komprenas."

'44 Respondis mastrino
Inĝibjorg', ; larmo vange
reflektas: ; "Li ne estas via
nevo, ; klare mi (tion spektas)
? (konjektas)."

'45 Respondis mastrino
Inĝibjorg', ; per tria vorto
finas: ; "Vire estas ŝi vestita, ;
havas hararon virinan."

'46 Sekvis ili al bordo sin, ;
ĉiuj en kompanio, ; Petro
sinjor' kaj Elinborg' ; kaj
Inĝibjorg' la tria.

'47 Inĝibjorg' staras sur blanka
sablo, ; ŝi multege ploras, ;
Elin staras en la pruo, ; ne
aŭdas ke ŝin doloras.

'48 "Vivu nun bone, Inĝibjorg'
; dana vi virin'! ; Mi ricevis
fianĉon mian, ; dum tempo vi
pruntis lin!

'49 "Vivu nun bone, Inĝibjorg'
; ĉe rivero bunte! ; Mi ricevis
fianĉon mian, ; longe mi donis
prunte!"

'50 Ploranta sin turnis al sia
burg' ; mastrino Inĝibjorg' ;
ĝoja velas Petro sinjor' ;
hejmen kun Elinborg'.

'51 Nupto ilia drinkata estis, ;
viglis vivdestino, ; iris ambaŭ
en saman liton, ; Petro sinjor'
kaj edzino.

'52 Ĉu orienten, ĉu
okcidenten, ; ĉu mondoĉefon
ekstreman ; – oni venos en
saman liton ; se Dio
kunigemas.)

& Sir Patrick Spens:

< Rekante 32 el 64 batoj por strofo, entute 1664 paŝoj dum 18 minutoj. El skotangla tradukis John S. Dinwoodie (Belarto 2, aŭtuno 1961). Per disdivido de strofoj donis en melodio lokon por nova rekantaĵo Martin Strid (2016).>

(#Melodio:

<1,6:4>

(#: FalSo /Fa Fa Fa SolLa /SolMi Mi Mi Mi;Do /Re Re Re TilLa /So So o; ReMi /Fa FaFa FalSo La /So lMi Mi i;Do /Re Re Re TilLa /So So o;; <[Ti:mi]> mi /mimi mido fa falmi /falso lla so o; /milre dolLa So milre /do do o; mi /mi mildo fa faldo /falso la so mi; /milre doLa So milre /do do o <[Ti:Fa]>)

)×26

)+

(& Strofoj:

'1 E2n /Dunfermlin' la2 /re2ĝo
sidas ; Kun /vino ĉe la2 /lipo;
"Kie /mi trovos e2stron
/le2rtan ; Por /mia nova2
/ŝipo?"

(×: **Nun /tondru nia danco2
/fo3rte ; /ki2e2l ondo2j
/ŝtormaj ; kaj /la ra2konto2n
/vo2ĉoj portu ; /la2ŭte en
flua2 /ĉeno!**)

'2 Parolas kavalir' mal/juna, ;
Kiu apude sidas: ; "Patriko
Spens superas ĉiujn, ; Li lerte
ŝipojn gvidas."

'3 La rego do leterojn skribis, ;
Sigelis ĝin en ordo, ; Ĝin
sendis al Patriko Spens, ;
Marŝanta sur la bordo.

'4 "Al Norvegujo tuj veliru, ;
Al Norveguj' transmara, ; La
reĝfilinon revenigi ; Al ŝia
hejmo kara."

'5 Li legis la unuajn vortojn, ;
Ridegis li sen fin': ; Sed kiam
legis li la tuton, ; Larmoj
blindigis lin.

'6 "Kiu min al la reĝ' menciis,
; Kaj kies la propono, ; Ke li
min sendu sur la maron -- ; En
tiu ĉi sezono?

'7 "Ekestu hajlo, neĝo, ŝtormo,
; Al Norveguj' transmara ; Ni
devos iri revenigi ; Ŝin al la
hejmo kara."

'8 La velojn lunde ili hisis, ;
Maren rapidi penis, ;
Malfruvespere en merkredo ;
Al Norveguj' alvenis.

'9 Apenaŭ du semajnojn ili ;
En Norvegujo loĝis, ; Kiam la
lordoj de la lando ; La skotojn
ekriproĉis.

'10 'La reĝan oron forkonsumi
; Vi skotoj nun arogas." ;
"Mensogas vi; mensogas ĉiuj;
Senhonte vi mensogas!

'11 "Arĝenton portis ni por
pagi ; La tutan ŝipanaron. ;
Kaj ruĝan oron en la ŝipo ; Mi
portis trans la maron.

'12 'Pretiĝu, ho ŝipanoj karaj;
Ni tie ĉi ne restos." ; "Ho ve!
ho mia kapitano, ; Mi timas,
ke tempestos.

'13 "Hieraŭ en krescent'
arĝenta ; Kuŝis la lun'
malnova: ; Mi timas, estro, ke
nin trafos ; Fatalo katastrofa."
.....

'14 Apenaŭ kvar-kvin mejlojn
ili ; For de la lando krozis -- ;
Ekblovis vento, mallumiĝis, ;
La mar' ekfuriozis.

'15 Rompiĝis mastoj: la
ventego ; Forŝiris ĉiujn
ankrojn: ; Martelis sur la ŝipon
ondoj, ; Frakasis ĝiajn
flankojn.

'16 "Ho! kie trovos mi
mariston, ; Kiu la ŝipon
gvidos, ; Dum grimpos mi al
la mastpinto: ; Eble mi teron
vidos."

'17 "Jen estas mi, maristo
lerta, ; Kaj mi la ŝipon gvidos,
; Dum grimpos vi al la
mastpinto: ; Sed teron vi ne
vidos."

'18 Antaŭ ol li du paŝojn iris ;
Ekkapti la ŝnuraron, ; Tabul'
rompiĝis kaj enlasis ; La
furiozan maron.

'19 "Portu al mi matracojn,
velojn, ; Kaj parton de l'
ŝnuraro, ; Por ŝtopi ĝin, sed
enfluadis ; La furioza maro."
.....

'20 Matracojn ili portis,
velojn, ; Kaj parton de l'
ŝnuraro ; Por ŝtopi ĝin, sed
enfluadis ; La furioza maro.
.....

'21 La skotaj lordoj malsekigi
; La ŝuojn ne deziris, ; Sed
antaŭ la ludfin' la ondoj ;
Super la kapojn iris.

'22 Multajn matracojn
silkbreditajn ; La mar'
surbruste tenis; Multaj nobelaj
lordofiloj ; Neniam hejmen
venis.

'23 La manojn la virinoj
tordis, ; La harojn ili ŝiris ; Pro
edzoj, filoj kaj amatoj, ; Kiujn
la mar' fortiris.

'24 Ho! longe, longe la virinoj
; Rigardos el la pordo; Ili
Patrikon Spens ne vidos ;
Veliri al la bordo.

'25 Ho, longe, longe la
fraŭlinoj ; Atendos en bonordo
; Amatojn karajn pereintajn ;
En la norvega fjordo.

'26 Cent klaftojn sub la
marsurfaco ; Ripozas la
marpredo -- ; Patriko Spens,
kun skotaj lordoj ; Kuŝantaj ĉe
l' piedo.)

& La portreto:

< Rekante 23 el 47 batoj por strofo, entute 1692 paŝoj dum 19 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:47> (

/MiSo SoSo FaLa LaLa; SoTi SoTi redo TiLa; MiSo SoSo FaLa LaLa; SoSo Tire redo dodo; mire doTi LaSo SoFa; redo TiLa SoFa FaMi;

(#Rekantaĵe: MiSo SoSo FaLa La; SolTi SoTi redo do; mire doTi LaSo Fa reldo TiLa So; MiSo SoSo FaLa La; SolTi SoTi redo do))×36)+

(&Strofoj:

'1 /Komercisto Petro Bulta ;
En la urbo Sankta Klara ; Estis
riĉa homo stulta, ; Monavida
kaj avara. ; kaj li estis
aroganta, ; tre fiera kaj tre
vanta.

(×: **Vi ja ne rekonis vin ; Do2
mi forvendis ĝin ; Nun vi
plendas al mi sed me2moru
ke ; Vi ja ne rekonis vin ;
Do2 mi forvendis ĝin.**)

'2 Li afektis esti klera, ; esti
homo eminenta, ; Kvankam
estis li mizera ; Sencerbulo
malprudenta, ; Sperta nur pri
du aferoj: ; Monbiletoj kaj
moneroj.

'3 Loĝis sed en Sankta Klara ;
Ankaŭ majstro Hildebrando, ;
Jen pentristo senkompara, ;
Fama en la tuta lando, ;
Plenrutina majstro lerta, ;
Geniulo multesperta.

'4 Majstre pentris li pejzaĝojn,
; Montopintojn kaj ĝardenojn,
; Grandajn urbojn kaj vilaĝojn,
; Gravajn historiajn scenojn, ;
Bestojn, fruktojn kaj floretojn,
; Grupobildojn kaj portretojn.
.....

'5 Jen la komercist' deziris ;
Mem sin vidi sur portreto, ;
Kaj al Hildebrand' li iris ; Kun
la aroganta peto: ; "Min
portretu, sed tre bone! ; Mi ja
pagos vin permone."

'6 Hildebrando sed ne ŝatis ;
La riĉegan avarulon, ; Kaj
koncize li konstatis: ; "Mi
plenumos la postulon. ; Sed
preparu la monerojn, ; Kostos
trimil ĝi talerojn."

'7 La riĉulo laŭte plendis, ;
Sed ne cedis Hildebrando. ;
Bulta fine tamen mendis ; La
portreton post marĉando. ; Je l'
dezir' li ja persistis, ; Dua
majstro ne ekzistis.

'8 Ĉe la stablo li eksidis, ; Ĉar
necesis ja modelo. ;
Hildebrando alrapidis ; Kun
krajono kaj paŝtelo, ; Kaj
desegnis kun fervoro, ; sed nur
dum duona horo.

'9 "Por hodiaŭ ĝi sufiĉas; Iru
hejmen do, sinjoro; Ĉiujn
fortojn mi dediĉas ; Nun al tiu
ĉi laboro, ; Kaj sciigon tuj mi
donos, ; Se mi ree vin
bezonos."

'10 Iris for la komercisto. ;
Hildebrando eklaboris ; Kun
rutino kaj persisto. ; Li
pentradis, li fervoris, ; Li ne
cedis, li obstinis, ; Kaj vespere
li jam finis.

'11 La portreto estis klara, ;
Vere bona, laŭnatura: ; Jen
riĉulo la avara ; Kun la nazo
laŭvultura! ; Hildebrand' ne
plu atendis ; Kaj la bildon tuj
forsendis. –

'12 Kiam la portret' alvenis, ;
Petro Bulta furiozis. ; Li
nenion ja komprenis, ; Kaj
naive li supozis, ; Ke necesas
duonjaro ; Certe por
portretofaro.

'13 Sed nun faris Hildebrando
; Ĝin dum la kvin lastaj horoj!
; Certe ĝin la diletanto ; Nur
priŝmiris per koloroj. ; Kaj por
tia fuŝlaboro ; Pagu tiom li da
oro!

'14 Li resendis la portreton, ;
Furioza pro kolero, ; Kaj
aldonis papereton ; Kun
riproĉa plendletero: ; "Ne
ofendu min, sinjoro, ; Per
ŝmirita fuŝlaboro!

'15 Mi ja tute ne rekonas ; Min
sur la fuŝaj' kolora, ; Kaj mi
akre vin admonas: ; Se ne
estos vi fervora, ; Se vi ne pli
bone agos, ; Mi al vi nenion
pagos!"

'16 Hildebrand' treege miris ;
Pri la plendo perletera, ; Kaj al
si li flustre diris: ; "Ho stultulo
vi mizera, ; Vi tre baldaŭ
pentos tion, ; Kaj vi pagos nun
eĉ plion!"

'17 Tuj li ŝanĝis la portreton: ;
Apud ĝi li sur la tolon ;
Pentris plenan monsaketon ;
Kaj subskribis la titolon, ; Kaj
li sendis la pentraĵon ; Al la
bildvendisto Draĵon. –

'18 Petro Bulta ĵus malbenis ;
La pentriston dum mateno, ;
Kiam ekscitite venis ; La
amiko Paŭl Viĉeno ; Kaj
raportis kun kolero ; Pri terura
mokafero.

'19 "En la elmontrej' de
Draĵon ; Vidis mi dum
preteriro ; Vere hontan
mokpentraĵon, ; Mi rekonis
vin kun miro, ; Kaj l' pentristo
sen skrupulo ; Ĝin titolis:
"Avarulo."

'20 La riĉulo forrapidis ; Al la
bildvendejo Draĵon, ; Kun
kolero li ekvidis ; Tie fakte la
pentraĵon ; Kun titolo
pleninsida ; "Avarulo
monavida."

'21 Kaj li kuris senhezite ; Al
la majstro Hildebrando, ; Lin
riproĉis ekscitite ; "Vi mizera
diletanto, ; Ĉu vi rajtas min
primoki ; Kaj per fia bild'
provoki?"

'22 Hildebrand' laŭŝajne miris:
; "Kie do vi mokon trovas?" ;
La riĉul' kolere diris ; "Ĉu,
fuŝul', vi nei povas, ; Ke vi
faris mokpentraĵon ; Kaj
elmetis ĝin ĉe Draĵon?"

'23 Hildebrand' sed sin
defendis ; Per trankvila gaja
voĉo : ; "Mi vin tute ne
ofendis, ; Kion celas la
riproĉo? ; Bildo ja ĉe Draĵon
pendas, ; Sed ĝi vin ja ne
prezentas."

'24 "Mi pretekstojn ne
bezonas!" ; Sed rekriis la alia.
; "Ĉiu homo ja rekonas ; Min
sur fipentraĵo via, ; Kiun
nomis sen skrupulo ; Vi
malice: "Avarulo."

'25 La portreto estas mia. ; Vi
ne rajtas ĝin misuzi ; Por
hontaĵo tiel fia; Mi minacas
vin akuzi, ; Se ne hontan la
pentraĵon ; Tuj forprenas vi de
Draĵon."

'26 "Sed vi akre pri ĝi plendis
; Kaj akcepti ĝin rifuzis", ; La
pentristo sin defendis, ; "Do
plenrajte mi ĝin uzis. ; Mian
bildon mi elmetis, ; Ĉar vi ĝin
ja ne aĉetis."

'27 "Mi aĉetas la pentraĵon!" ;
Kriis Bulta ekscitite, ; "El la
elmetej' de Draĵon ; Ĝin
forprenu senhezite. ; Ja ne
mankas la moneroj ; Jen tri
miloj da taleroj!"

'28 Hildebrando sed deklaris: ;
"Mi ĉi tion ja permesas. ; Sed
sinjoro, vi eraris, ; Por aĉeto
nun necesas ; Multe pli da
ormoneroj: ; Dekses miloj da
taleroj!"

'29 Bulta kriis plenkolere: ;
"Ĉu vi estas frenezulo? ; Via
diro estas vere ; Krimoplena
monpostulo! ; Kie restas la
kompato, ; Vi rabisto, vi
pirato!"

'30 "Ho sinjoro komercisto, ;
Vi malprave nun protestas," ;
Diris fama la pentristo, ; "Ĉar
la bild' ĉe Draĵon estas ; Ja
penetraĵo multvalora, ; Ne nur
tolo plenkolora.

'31 Sed sinjoro, min
komprenu: ; Tute ne eĉ ja
necesos, ; Ke vi la penetraĵon
prenu, ; Ĉar ĝi certe interesos ;
Ankaŭ homon ja alian, ; Ne mi
volas monon vian.

'32 Mi ĝin vere ne bezonos: ;
Ja por vendi la penetraĵon ;
Lotbiletojn mi eldonos, ;
Aĉetebajn ja ĉe Draĵon; Kaj
vendante lotpaperojn ; Mi
postulas nur taleron.

'33 Kaj ne estos malfacile, ;
Tridek mil biletojn vendi; Do
pripensu vi trankvile; Se vi l'
bildon volas mendi, ; Pagu tuj
per ormoneroj ; Tridek milojn
da taleroj!"

'34 Febre tremis la riĉulo ; Kaj
li bolis pro kolero: ; Ĉu en ĉiu
urbangulo ; Oni sciu pri l'
afero? ; Kaj ĉu ĉiu fibubeto ;
Moku lin pro la portreto?

'35 Li aĉetis la penetraĵon, ;
Dum kolere li malbenis, ; Kaj
li kuris tuj al Draĵon, ; Kie li la
bildon prenis, ; Kiun li ja ĵus
aĉetis, ; Kaj li ĝin – en fornon
ĵetis.

'36 Ne plu mendis li portreton,
; Ĉar li timis ĝian prezon, ; Ne
li riskis bildaĉeton, ; Por eviti
la elspezon, ; Ĉar turmentis lin
suferoj ; Pro la tridek mil
taleroj.)

& Olav Rajdistrozo:

< Feroe rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 1696 paŝoj dum 13 minutoj. Islande rekante 20 el 29 batoj por strofo, entute 1537 paŝoj dum 16 minutoj. Norda Kantaro #4417. Variantoj feroa kaj islanda. El feroa tradukis Martin Strid (2016). Duoble tradukiĝis strofoj '2, '16, '17, '27, '29, '35, '37 trioble '32, '39 kaj kvaroble '36.>

(# Melodio:

((#Feroe: <2,3:4> /mi mi mi mi /so solfa mi i; /soso sofa mi i; /mi mi re re /mi milre do lTi; /LaTi dore mimi mire; /dodo dore mi mire /do Ti do o)

?

(#Islande: <1,6:29> /soososo do3so soolala so; mifa so mire do3;so soso sooremi fami doo;mifa soso soofa milso; soso lalalaa sofa mire do dore; mire mimifaa soso lafa mi re do o)

)×53)+

(& Strofoj:

'1

(&Feroe: "/Kien vi rajdos,
/Olav mia?

(×:; – /**Karbo kaj forĝist'** – ;)
/Supre pendas ki/raso via."

(×:; /**Junaj viroj, viglaj viroj!**
; /**Iru plankon, dancu kun**
/granda em'!))

?

(&Islande: "/Kien vi rajdos,
Olav mia?

(×:; **Se erar', li en star'** ;)
Supre pendas kiraso via." (×:;

Kaj la ruĝa brulis fla2m'. ;
Milde ŝarĝon li metis sub la
montkruto ; milde ŝarĝon li
metis sub la monta krut'.))

'2a "Iros mi al sablarbaro
sovaĝcervinan ĉason faros.

'2b Al sablejo mi vojaĝas
ĉasos mi cervinon sovaĝan."
.....

'3 "Ne cervinon ĉasos vi vi
iras al via luda tili'

'4 Blankas ĉemizo via lavita
..... en sango estos ĝi makulita.
.....

'5 Blankas ĉemizo, el bona
tranĉ' ĝin trafos poste
sanga lanĉ'.

'6 Olav sin turnas de sia
patrin': "Dio ne lasu
pravigi vin."

'7 Olav rajdas laŭ roko
antaŭen trovis li elfan
domon jen.

'8 Olav rajdas laŭ roka dekliv'
..... trovas li elfojn el masiv'.
.....

'9 Elvenis jen elfin' plekta
hararo ŝultris ŝin.

'10 Elvenis jen elfinar'
plektitaj haroj sur ŝultra par'.
.....

'11 "Bonvenon, Olav Rajdista
roz' vi dancu kaj kantu por
ni grandioze."

'12 "Ne devas vi plekti
hararon por min mi ne
venis jen por posedi vin."

'13 "Se vi ne venis por svati
min mi ne celis posedi
vin."

'14 "Mi ne povas plu ĉe elfoj
resti mi morgaŭ mian
nupton festos."

'15 "Se vi ne volas ĉe elfoj
resti malsana vi vian
nupton festos."

'16a Ĉu vi volas morgaŭ
kadavri aŭ dum sep vintroj
malsana palavri?

'16b Ĉu vi emas morgaŭ
tombane aŭ dum sep
vintroj kuŝi malsane?

'17a Ĉu vi sep vintrojn kuŝos
pajlerojn aŭ iros morgaŭ vi
en teron?"

'17b Ĉu vi sep vintrojn
malsanumu aŭ vi morgaŭ
eniru humon?"

'18 "Du la elektoj, neniu
plaĉas, longe kuŝi malsana
aĉas."

'19 Du la elektoj, neniu molas,
..... mi longe malsana kuŝi ne
volas.

'20 Prefere mi estos morgaŭ
tombano ol dum sep
vintroj kuŝi malsana

'21 Prefere mi morgaŭ eniros
humon ol sep vintrojn
malsanumos."

- '22 Alportis ŝi drinkujon jen
..... en ĝi estis jam venen'
- '23 Tason portis ŝi da bier'
en ĝi flosis venener'.....
- '24 Ŝi servis lin per drinka
korn' en ĝi gvatis venena
dorn'
- '25 Unuan drinkon Olav levis
..... lia larĝa zono krevis
- '26 "Aŭdu, Olav en bela lin',
..... antaŭ forrajdo vi kisu
min."
- '27a Olav sur selarko sin
apogis li kisis elfinon, lin
ne logis.
- '27b Olav sur selarko sin
premis li kisis ŝin,
kvankam ne emis.
- '28 Ŝi kisis lin malfride
adiaŭis lin perfide
- '29a "Diru al patrino en dom'
..... stumblis via ĉevalo sur
ŝton'
- '29b Diru al patrino en hejma
hal' sur ŝtono stumblis via
ĉeval'"
- '30 Olavo venas hejmen al
bien' ekstere staris la
patrino jen
- '31 "Kial vi tremas, kial pala,
..... ĉu vi estis en elfa balo?"
- '32a "Kara patrino, mi veron
diras mia ĉevalo ŝtonon
stumbliris.
- '32b "Kara patrino, mi diras
por kon' stumblis mia
ĉevalo sur ŝton'.
- '32c "Kara patrino, mi diras
veron mian ĉevalon faligis
rokeron.
- '33 Ja estas mi trema, estas mi
pala, hieraŭ mi estis en
elfa balo.
- '34 Ja estas mi trema kaj kiel
basto, hieraŭ mi estis elfa
gasto.
- '35a Venigu pastron, patro
kara, kara patrino, min
estu najbara."
- '35b Patro, venigu pastron
erudan, kara patrino, min
estu apuda."
- '36a Olav sin turnis urĝe al
mur' vivis ĝis noktomezo
nur.
- '36b Olav sin al muro turnis
..... estis lia lasta diurno.
- '36c Olav sin turnis al muro
haste estis lia vespero
lasta.
- '36d Olav turniĝis al muro
peze vivis nur ĝis
noktomeze.
- '37a Venis de tiu bien' tri
kadavroj belaj jen.
- '37b Venis de tie por funebro
..... tri kadavroj jam celebraj.
.....

'38 Unua Olav, la dua l' edzin',
..... la tria, la panjo, mortigis
sin.

'39a Unua Olav, la dua la par',
..... la tria, la panjo, malĝoja
far'.

'39b Unua Olav, la dua l'
eskort', la tria, la panjo,
malĝojis ĝis mort'.

'39c Unua Olav, la dua l'
edzin', la tria, la panjo,
malĝoja fin'.)

& Ĉielarka fabelo:

< Rekante 35 el 61 batoj por strofo, entute 1708 paŝoj dum 18 minutoj. Verkis Adam Asnyk. El pola tradukis Antoni Grabowski (Parnaso de Popoloj, 1913). Baladigis Martin Strid (2016) per sveda ŝotiso el Särna.)

(#Melodio:

<:61> (

/mi relTi do TilLa SiMi Mi Mi; MilFi SilLa Ti Ti LalSi Laldo mi mi; mi relTi do TilLa SiMi Mi Mi; MiFi SiLa Tido TiSi;

(#Rekantaĵe: La La La a; do dore do TilLa Ti mi mi relTi; do dolre do TilLa Tido TiSi Mi; do dore do TilLa Ti mi mi relTi; do Lado Ti MilSi La La La a)

)×28)+

(&Strofoj:

'1 /De lu2lilo2 min postiris ;
Ĉi2e2larka mi2rfa2belo, ; Kaj
ĝi2 flustri2s melodie ; Sorĉ-
parolojn al orelo.

(×:; **en la danc'**. ; **Tenu la
paŝo2jn en la ĉeno2 ; ni
ve2turo2s per la ĉielark'**. ;
**Brilas koloro2j de ĉagreno2.
; Ligas ni kosmo2n en la
danc'**.)

'2 Naskis ĝin en fruvespero ;
Vartistinoj-babilado. ; Kaj kun
mi ĝi poste dormis ; Kaj min
kisis dum songado.

'3 Ĉiam kune vekigante, ; Ni
elkreskis el luliloj, ; Kaj ĝi
min en strangan mondon ; Ien
portis sur flugiloj —

'4 Super la purpuraj maroj, ;
Super la arĝent'-riveroj, ; Sur
la ĉielarka ponto ; En
transmondon de misteroj.

'5 Malfermiĝis laŭ ĵurvorto ;
Rok-pordeg' el diamantoj, ;
Kaj mi pasis en sorĉlandon ;
De fantomoj kaj gigantoj.

'6 Kaj post mi pordegon
fermis ; Aŭ feino aŭ diino, ;
Do mi iris en la landon ; Vagi
ĝis la vivofino.

'7 En la stranga lando, kie ;
Ĉio vivas kaj parolas, ; Kie ĉiu
ŝtono spiras ; Kaj fariĝi homo
volas —

'8 Iris mi tra helbrilanta ;
Arbareto orfolia, ; Kie floras
en la ombro ; La filika flor'
magia.

'9 Iris mi tra l' arbareto, ; Kie
arboj kantojn bruas, ; Kie de l'
junec' eterna ; La kristala
fonto fluas.

'10 Kaj salutis min envoje ; La
okuloj de florrondoj ; Per
rigardo forturnita ; Al senlima
spac' de mondoj.

'11 Kaj salutis homavoĉe ;
Min birdaro kolorplena ; Kaj
montradis pluan vojon ; Ĉe l'
abismo malserena.

'12 Kaj obeis mi aŭguron, ;
Trinkis mi el viva fonto, ; Tra
sovaĝa la dezerto ; Iris mi sen
tim' al monto.

'13 Vane siblis la rampaĵoj ;
Kaj fantomoj min teruris ;
Mirhelaĵon rigardante, ; Mi
antaŭen ĉiam kuris.

'14 Post traĵo de l' dezerto ;
Kaj de l' akvo ŝaŭm-ondanta, ;
Mi ekstaris apud monto ;
Vertikale leviĝanta.

'15 Supre brilis la kristala ;
Kastel' de gigant' kruela, ;
Kies sorĉan povon spertas ;
Virgulino la plej bela.

'16 Antaŭ la kastelo drakoj ... ;
Ruĝajn faŭkojn larĝ-distiras ;
Kaj per oraj fajroflamoj ; Ĝis
la nuboj supren spiras.

'17 Hirtigante bronzaĵajn
skvamojn, ; Ili gardas sorĉ-
trezoron, ; La plej belan
virgulinon, ; De kristal'-
kastelo gloron.

'18 Tamen malgraŭ vigla
gardo ; Mi ekvidis ŝin sur
monto, ; Ŝin, pro kiu mi
alvenis ; Doni vivon kun
volonto.

'19 Havis ŝi sur frunto stelon, ;
Sub piedoj rikoltilon ; De lun',
kaj anĝel'-vizaĝon, ; En okuloj
lazurbrilon.

'20 Tuj rigardo ŝia vekis ;
Mian amon en la koro, ; Kaj al
ŝi nun supren-celi ; Mi
komencis kun fervoro.

'21 Do mi tuj, ĉe l' glata muro,
; Per plektaĵ' de konvolvuloj ;
Super senfundaĵ' ekpendis, ;
Ŝin serĉante per okuloj.

'22 Kaj mi grimpis ĉiam
supren, ; Jam proksime ŝin
admiris, ; Kaj al rava reĝidino
; Ambaŭ manojn mi eltiris.

'23 Tuj mi kaptos ŝin en
brakojn ... ; Ve! hederoj sin
disŝiras — ; Kaj mi falis en
abision, ; Kaj pereas kaj
sopiras!

'24 Kvankam kora sang'
forfluas, ; El abismo, la
malhela, ; Vokas mi: "Ho
kavaliroj! ; Kuru, kuru post la
bela!"

'25 Grimpu supren! ĉiam
supren! ; Vin sur nigrajn
rokojn svingu, ; Ke alvenu
feliĉulo ; Kaj posede ŝin
atingu!

'26 Se li ne atingos — falos, ;
Ne vantiĝos vivo lia, ; Ĉar plej
bona vivoparto ; Estas
postkurado tia.

'27 Vidi eĉ de malproksima ;
Sorĉ-kastelon el kristalo, ;
Indas iri sango-page ; Al la
land' de l' idealo.

'28 Se denove komenciĝi ;
Povus mia vivokuro, ; Duafoje
mi postkurus ; Belulinon en
lazuro.)

& Bresta balado:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 1740 paŝoj dum 19 minutoj. Norda Kantaro #4408. El feroa tradukis Martin Strid. Klarigojn (*) vidu post la strofoj.>

(# Melodio:

<1,6:29> (

/doTi re3do doTi Ti; La3La LaaLaMi La; LaTi doTi TiTi Ti;Ti
TiTi Tire do;

(#Rekantaĵe: TiLa La SiLa Ti La; LaaLaLa La3Mi So3So Fa3Mi;
MiiMiMi LaTi do Ti La a)

)×60)+

(& Strofoj:

'1 /Frue estis en maten' ; suno
ruĝas en mar' ; Bejno budon
eniris ; al Bresto, dorma kar'.

(×:; **Paŝu gajan la dancon ;
Brilas aŭroro bele taga ;
Venu en alta somertemp'!**)

'2 "Ekstaru Bresto, mia frato ;
suno ore brilas ; blovas neniu
vento sur ondo ; kaj maro nun
trankvilas.

'3 Serĉu iron al Eta Dujmo* ;
bordo ne ŝaŭme blankas ; pli
neniam bonis tago ; kapti
ŝafojn mankajn."

'4 Ŝnurojn prenis kaj rimenojn
; zone fiksis glavojn ;
malsupren al strando iris ;
postsekvis du knaboj.

'5 Diras Sigmund Brestofilo* ;
li naŭ vintrojn aĝas ; "Iros mi
al Eta Dujmo ; vidi ŝafojn
sovaĝajn."

'6 Respondas Toro Bejnofilo ;
dek du jarojn plenis ; "Patro,
iru vi al Dujmo ; lasu min
kunveni!"

'7 "Kion vi sur Dujmo farus ;
mallarĝas grimpopadoj ; kaj
profundas rokabismoj ; vi
malaltas, knaboj."

'8 Respondis Sigmund
Brestofilo ; kreskis en
konkludo ; "Kiu kreskas ĉe
cindro ene* ; taŭgos malmulte
ludon*."

'9 "Veron li diras mia filo", ;
Bresto ekis vortojn: ;"Neniu
malhelpu bravan ; menson de
junforto."

'10 Prenis boaton el densa
nesto ; maro al ili ĝemis ;
knaboj sidiĝis en la poŭpon ;
kaj estroj ekremis.

'11 Al insulo ili eniris ; teren
tiris boaton ; kaj antaŭen
suriris monton ; kun krutega
pado.

'12 Piedviglaj kaj ungfiksaj ;
nenion malkuraĝas ; vigle
kuras rokfalrandon ; preni
ŝafojn sovaĝajn.

'13 Kvincent ŝafoj sur insulo ;
Eta Dujmo restis ; nigris ĉiuj
karbaturfe ; speco konata estis.
.....

'14 Rapidaj kiel sovaĝaj birdoj
; en printempalveno ; oni diras
ke hvalbanoj* ; ĉiajn specojn
prenis.

'15 Ŝajnas al mi kolerige ; tia
gregdetru' ; unuajn ŝafojn en
Ferooj ; ŝatus mi vidi plu.

'16 Tute bone taŭgis estroj ;
sovaĝŝafojn ĉasi ; iris al boato
malsupren ; kun kaptaĵo pasi.
.....

'17 Teni* antaŭen al Granda
Dujmo* ; hejmingon celis ;
vidas tri fortikajn ŝipojn ;
kontraŭ ili veli.

'18 Da kiraso tri dekduojn ;
prue nombris ili ; glimas
lancoj, oraj kaskoj ; glavojn
suno brilis.

'19 Bresto diris vortojn tuj ;
bonis li valora ; "Bone konas
mi la velojn ; kaj drakpruon*
oran.

'20 Aŭdu Bejno, mia frato, ;
kiel nin konsili? ; Tiuj estas
viroj kiuj nin ; volas malutili.
.....

'21 Unue velas Havgrimo ; kaj
Geŭta* Trondo due ; antaŭ ol
trihora* fino ; ni anhelos skue.
.....

'22 Unue velas Havgrimo ;
laste velas Bjarno ; pre* ol
sun' en maron sidas ; sangos
nian feron karno."

'23 Baldaŭ tuŝos
tajdmarfluon* ; misas la
destin' ; Rektrokon atingos ni ;
kaj venos en Ravin'.

'24 Venos ni en pado supren ;
povos ĝin defendi ; hakos la
heroojn kiuj ; volas vundojn
vendi."

'25 Al tio respondis Bejno
forta ; li bone saĝis mem ; "Ni
nin tenos ĉe insulon ; kaj
prenos duran remon.

'26 Tenu al venonta kabo! ;
Atingeblas tero! ; Ne sin
laŭdos ili ke ; facilis la
konkero!"

'27 Tenis ili al insulo ; poste
militŝip' ; du videblis
konkursremi ; blankis ŝaŭma
vip'.

'28 Brakoj ruĝas, vizaĝoj
ruĝas ; forte tendenoj ŝvelas ;
remiloj kurbas, remingojn
turbas ; ŝaŭmon pruo pelas.
.....

'29 Akre enŝprucis boatrando ;
okcidenta vento ; trafo sur
malflusan ŝtonon* ; rompis
boatbendon.

'30 Sigmundo kaj Toro junaj ;
ne malfruaj ekis ; kuris ili sur
la teron ; Bresto kaj Bejno
sekvis.

'31 Iris ili al la roko ; kiuj sciis
grimpi ; supren levis do la
knabojn ; kaj metis ilin
simple.

'32 "Aŭdu, Bejno, mia frato! ;
Staros jen batalo. ; Kelkaj
Helon* alveturos ; antaŭ nia
mortfalo!

'33 Prenu vi la sudan flankon ;
alte eblas firmi ; staros norde
mi, kaj tie ; malfacilas ŝirmi."
.....

'34 Havgrimo kaj kampul-
Bjarno ; rokon iras antaŭen ;
Trondo kun siaj sekvofraŭloj ;
bordon* vagas ĉirkaŭen.

'35 Provi volis fortaj knaboj ;
rapide ataki ; fratoj akre kaj
masakre ; sangoflue hakis.
.....

'36 Fratoj sciis glavojn flegi ;
ludon bone konis ; ruĝiĝis
kirasoringoj* ; palon al vangoj
donis.

'37 Fajro fumis el glaveĝoj ;
ŝtalo ŝtalo klakas ; korpoj
falas kvin malsupren ; cerbo
roke flakas.

'38 Bejno hakis morten duujn ;
trian forta Bresto ; puŝis for
aliajn ĉiujn ; ĝojis ne
moleston.

'39 Tiam Havgrimo koleris ;
turnis sin al Trondo ; "Kial vi
malflusaŝafe ; vagu strandon
ondan?

'40 Tial al vi mi teron donis ;
ke vi batalu klinge ; kial vi
lasas, kaj tuta trupo ; glavojn
pendi inge?"

'41 Ruza estis Geŭta Trondo ;
respondo ne mankis lin ;
"Multan vi havemas teron ;
por pelte kovri vin!

'42 Vi heroo nomu vin ; stulta
vi estas prave ; vi ne povas per
du dekduoj ; sur du viroj
venkon havi!

'43 Vi rikoltu triston, mokon ;
kaj longe ĝin ricevos ; trupo
kuris al du viroj ; kaj fantomi
devos.

'44 Se vi inter viroj validu ;
kaj ne mankas em' ; iru rokon
vi unue ; kaj montru taŭgon
mem!"

'45 Koleriĝis Havgrimo ;
preter la maltimo ; kuris
kontraŭ Bresto supren ; kun
lanco en proksimo.

'46 Lanco glitis en talion ;
ŝtalo femurprofundon ; Bresto
faris finan trukon ; sentis
mortigvundon.

'47 Premis li sin sur pikon plu
; gambo sangon lanĉis ; hakis
forte Havgrimon ; ŝultron,
brakon detranĉis.

'48 Morta falas Havgrimo ; kaj
Bresto super lin ; Bejno luktis
vire lerte ; tamen falis fine.

'49 Toron fluis larmo vange ;
duriĝis Sigmund kore ; "Ni ne
ploru, ho fratul' ; sed kaŝu
bonmemore!"

'50 Tretas Trond sur batalejo ;
li vortojn bone lasis ; "Venkas
ne en ĉiu vintro ; en Valhal*
pli bonas ĉasi.

'51 Sperti devas ĉi herooj ; iri
Bifrosten* for ; morti devos
ĉiu homo ; sed ne lia glor'.

'52 Eblas ne ke luktan ludon ;
fermas fino jama ; knabojn
prenu ni por sendi ; al la vojo
sama."

'53 Svejno ingan glavon tiras ;
Bjarno diras en rapido ;
"Ŝajnas min fiago hunde ;
mortigi homidojn.

'54 Devus knaboj ja ricevi ;
pacon inter viroj." ; Multaj
ŝatas Bjarnajn vortojn ; sed
Trond alion diros.

'55 "Saĝa homo antaŭtentas ;
knabojn haku sen graco! ;
Kreskos ĝis luktuloj ili ; al ni
ne ofertos pacon."

'56 Koleriĝis Bjarno tiam ;
"Estu vi maltotem'!* ; Ne
mortigu vi la knabojn ; ol min
prefere mem!"

'57 "Tio ne estis mia volo" ;
Trondo vortriparas ; "Mi nur
volis provi kie ; via penso
staras.

'58 Manĝon ofertos mi al ili ;
kaj aliajn favorojn ; mem
edukos ilin mi ; instruos
leĝojn kaj morojn.

'59 Instruos sporton kaj
armludojn ; poemojn kaj
rakontojn." ; Ĉiuj bataleje
starantoj ; ŝatis nun ruĝan
Trondon.

'60 Estrojn ili nun honore ;
kampe enterigis ; Trondo kun
si prenas knabojn* ; kaj
norden al Geŭto navigis.)

<& Klarigoj (*) al Bresta balado:

'3 Eta Dujmo (Lítla Dímun),
neloĝata feroa insulo krute
alta.

'5 Sigmundur Brestisson
naskiĝis en jaro 0961.

'8 Ĉe cindro, ĉe fajrejo en
domo. ; Ludo: aktivaĵo, vigla
faro ĝenerale.

'14 Hvalbo estas plej norda
vilaĝo de feroa Sudinsulo.

'17 Teni, direkti ŝipon. ;
Granda Dujmo, trioble pli
granda insulo norde de Eta
Dujmo.

'19 Drakpruo, ornamo de
militŝipo en formo de
drakkapa skulptaĵo.

'21 Geŭto, vilaĝo sur feroa
Orientinsulo. ; Trihora: "økt"
estas okono de tagnokto.

'22 Pre = tempe antaŭ.

'23 Kelkloke maro fluas
okcidenten aŭ orienten kaj
ĉirkaŭ ĉiun sesan horon tiu
fluo inversas direkton.

'29 Malflusa ŝtono dum
malfluso malprofundas aŭ eĉ
superas akvosurfacon.

'32 Hel estas diino de regno de
morto.

'36 Kirasoj korpaj konsistas el
kunkudritaj ferringoj.

'50 Valhalo estas la halo de
dioj kaj mortintaj herooj.

'51 Bifrost estas ĉiela vojo al
Valhalo, ankaŭ ĉielarko.

'56 Maltotemo: La originalo
havas na "vargur í ve", tio
estas, lupo en oferejo. Tio
signifas iun kiu murdis aŭ
alimaniere krimegis en sankta
pacejo, ĉu templo ĉu
parlamentejo, kaj kiu tial
meritas nek respekton nek
protekton de leĝo.

'60 Trondo edukos la knabojn.
Toro restos ĉe li, sed Sigmund
plenkreska iros ĉe norvegan
reĝon Olaf Tryggvason kiu
donos al li taskon kristanigi
Feroojn. Pri tio rakontas aliaj
baladoj.

>

& La fantomo de la reto:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 1776 paŝoj dum 19 minutoj. Verkis? kaj el angla tradukis? William F. Orr (1995). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por &Konfeso kaj parte nova rekantaĵo. Klarigo (*): '2 k = kaj.>

(#Melodio:

<1,6:37> (

/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mi; mifa somi mire redo;
dore doTi LaLa LalSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a)

)×48)+

(&Strofoj:

'1 /Kiam dormas la serviloj ;
Kaj tekuloj en la dom', ; Kiam
noktas en Sidnejo ; Je la
posttagmez' en Rom',

(×:; **Zorgojn ĝi foje forgesas**
; Al ĝi reto tro promesas ;
nek la nokton dormis ĝi;
Zorgojn ĝi ĝoje forgesas.)

'2 Rerankontas la retanoj ;
Kun tremado k* timet' ; Pri
nebula la estaĵo, ; La Fantomo
de la Ret'.

'3 Kiel Flustro sur Etero, ;
Flugas li de Nod' al Nod'; ;
Servas lin ĉiu Servilo; ; Li sin
kaŝas en la Kod'.

'4 Se vi iam lin renkontos, ;
Forfuĝegu kun impet' ; De l'
Vagant' de Ciberio, ; La
Fantomo de la Ret'.

'5 Pri l' natur' de lia vivo ; Nur
eksplikas l' anekdot', ; Ke li
estas ne uzanto, ; Kaj nek
homo nek robot'.

'6 Eĉ ne certas pri la sekso ;
De li, ŝi, ĝi, ŝ/li aŭ ri, ;
Kvankam oni ja rakontas ; Per
la Fundamenta "li".

'7 Skeptikuloj, nekredantoj ;
Nomas Lian Ombran Moŝton ;
Nur la enfatras' k elfa;tras',
Ŝtopantaj la e-poŝton.

'8 Tamen iuj ĵuras vidi ; La grimacon dum vertiĝ' ; En momenta brilo antaŭ ; La sistema frakasiĝ'.

'9 Kiel noktomeza vido ; De aliplaneda NIF' ; ; Ili vidis lin ridantan ; En la pikselar' de .gif,

'10 Dum la komputil' zumzumis ; Kvazaŭ dentformonda kver' ; De muziko ne kantata ; De l' Fantomo de l' Oper'.

'11 Nek la Kodoj nek Pasvortoj ; vin protektos de l' Horror' ; ; Pro datensoif' li voros ; Viajn Dosierojn for.

'12 Datenojn li elĉerpos, ; Li aloros kiel Kajt' ; Por forsuĉi Dokumentojn ; Ĉu pobite ĉu po bajt'.

'13 Iam estis li ja homo ; (Aŭ ja iam estis ŝi), ; Universitatstudento ; Kun eduka stipendi',

'14 Kies markoj subsinkantaj ; Teren falis kiel lad'. ; Ri fuŝadis je kemio, ; Je belarto k verkad'.

'15 Onidire la verkadon ; Faciligus komputil' ; ; Iris ri komputilejon ; Per ŝtelado de l' ŝlosil'.

'16 Ekde tuŝi la Klavaron ; Venis nova perspektiv' ; ; Brilis klare de l' Ekranon ; La Signifo de la Viv'.

'17 Jen la Amo! Jen Obsedo, ; Dio, Sekso, Ĝoj' k Ĝu'! ; Fuĝis for la Dek Ordonoj. ; Regis Deksesum' k Du.

'18 Analogo retrofluis, ; Kaj alfluis Granda Ond' ; De senfina Ciferar' ; El liaj fingroj al la mond'.

'19 Li traŝvebis tra la Reto, ; Fosis en la ftp, ; Ebriiĝis per BBSoj, ; Naĝis tra la IRC.

'20 Li alŝutis Dosierojn ; Kaj elŝutis tra l' aer'. ; Li e-poŝtis mondovaste ; "Jen la Vivo! Jen Liber'!"

'21 Dum la nokto, dum la tago, ; Dum aŭtuno k printemp'-- ; Ĉar la Ret' neniam dormas, ; Li forgesis pri la Temp'.

'22 Kaj Datenoj! La Datenoj! ; Ho Detena Superŝut'! ; Li do kreis mil Robotojn ; Por ĝin ĉerpi el la put'.

'23 La Robotoj alŝutadis ; Laŭ Ordonoj de Program', ; Kaj li iris por ripozi ; Ĉe kanalo #VeraAm

'24 Sed, pro manko de la
sprito ; Aŭ de vigla estetik' ;
Je elekto de Kromnomo ;
Tajpis li <strek> nick <spac>
nick.

'25 Estis dudek babilantoj ;
Laŭta, stulta grego. Nu, ; Kia
teda grup'! Afliktis ; nickon
ondo de Enu'.

'26 Li sopiris Retdisigon ; Pro
l' vortaĉa superŝut' ; Kiam
venis Kaŝmesaĝo ; Jene:
InO100 Salut' :-)

'27 Fine oni lin rimarkis! ;
Preskaŭ kaptis nickon mut' . ;
Post momenta hezitado ;
Tajpis li *nick* resalut!

'28 Ili baldaŭ amindumis ; En
Privata Kanalet'. ; (I) Ĉu vi
inas aŭ vi iĉas? ; (n) kial
gravas en la ret'?

'29 (I) Kiomjara? Kiurasa? ;
Ĉu parulo estas vi? ; Kiu estas
vi? Kaj _kio_? ; (n) ĉio kion
volas mi.

'30 korpe estis mi nenio, ;
sola, trista, k sen fort' ; sed la
ret' estas parola, ; kie gravas
nur la vort'.

'31 (n) ho, mi lokojn al vi
montrus! ; mirindaĵojn de la
ter'! ; bildojn, tekston, k
muzikon ; en privata dosier'
.....

'32 venu kun mi! ni esploru! ;
estu mia, InO100! ; ni vojaĝu
sur flugiloj ; de facila bita
vent'!

'33 Tra la Fibrofaskoj glite ;
De Menuo al Menu' ; Ili velis,
soris, plongis, ; Pliprofunden k
eĉ plu:

'34 Nehaltinte ĉe Pasvortoj, ;
Ĝis la nekonata Kont' ; En
Senlumo de la Centro ;
Nevidita de mortont'.

'35 Kie pli mallertan paron ;
Ekforigus la Sistem', ; Sen
Menuoj aŭ Helpiloj, ; Nur
arkana VAX-a Skem',

'36 Kaj apenaŭ eblis legi, ;
Preskaŭ nigris la Ekran': ;
InO100 Mi timas. :-(Helpu!
; Ni reiru, ho kompan'!

'37 (n) ne! antaŭen!--li instigis
; Senrimarke je l' Horror'. ; (I)
Mi malamas komputilojn. ;
Ĝis revid', mi ŝaltas for.

'38 (n) InO100 ne min forlasu!
; mia kara! mia hom'! ; sed
alvenis la respondo ; --> NE
EKZISTAS LA KROMNOM'
.....

'39 Kompreneble li antaŭe ;
Ekkonstatis per fingrum' ;
Rian Kontadreson, Nomon-- ;
Estis plu Memor-Resum'.

'40 Kaj li povos ĝin aliri ; Post
eliĝi el ĉi tru' ; Kie mankis
Helpekranoj ; Kun nek FAQo
nek Menu'.

'41 Estis tamen ne facile ; Sin
eligi per si mem, ; Nesciante
eĉ la bazon ; De la Lingvo de
l' Sistem'.

'42 Al la cent diversaj Lingvoj
; Kiujn regis lia cerb' ; La
respondo sur l' Ekranon ; Estis
NEKONATA VERB'.

'43 Tajpis li pro ĝen' /infern--
; Flagris kvazaŭ antaŭ kraŝ' ! ;
Kaj aperis tekst' : Esperon / ;
/ĉiun/~Lasu/ĉe.l'Enpaŝ.

'44 ĈU VI VOLAS IRI
PLUEN? ; Kaj eksciis li en
prav' ; Sian veran Vivocelon--
; Falis Fingro sur la Klav'.

'45 En la komputila ĉambro ;
En la frumatena klar' ; Oni
trovis la kadavron ; Kun la
kap' sur la klavar'.

'46 La memoro--forviŝita. ;
Kaj la korpo--kiel lad'. ;
Kvazaŭ li aŭ ŝi ekmortis ; Per
animo-elŝutad'.

'47 Oni metis rin en ĉerkon ;
Kun funebro sen parad' ; (Kaj
kun malsukcesa marko ; En la
kurso pri verkad').

'48 Rian konton oni fermis, ;
La robotojn viŝis for. ; Sed
persistis la legendo, ; ke li
restas en Memor'.

& Mvajnun kaj Nandar:

< Ripete 43 sed rekante 33 el 85 batoj por strofo, entute 1870 paŝoj dum 21 minutoj. Popolan fabelon el Burmo (Birmujo) poemigis Julio Baghy (Ĉielarko, Tenerife 1966). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:85> (

/(LaLa LaTi dodo TiLa; dodo TiLa MiMi ReDo; LaLa LaTi dodo TiLa; dodo TiMi FiSi La La; mimi redo mimi redo; mimi miMi FiSi La La;)×2

(#Rekantaĵe: LaLa LaTi do mi; miimimi mire doTi LaSo; TiTi Tido re fa; mimi mire do; TiTi Tido re fa; fafa mire doTi LaLa Ti; LaLa LaTi do mi; miimimi miMi FiSi La La)

)×22)+

(&Strofoj:

,&1:

'1 /En ĝangalo muĝe bruis ; la plantaro pompe bunta, ; tra kaskadoj lante fluis ; akvo larĝa kaj profunda... (':; Morne regis maltrankvilo.) (:; Morne regis maltrankvilo. ;) En la denso de l' lianoj; ĉasi tigro ŝtele paŝis, ; inter branĉoj sen rikano ; sin simioj treme kaŝis... (':; Borde kuŝis krokodilo.) (:; Borde kuŝis krokodilo. ;)

(×: Paŝu en la danco ; Ĉu la junuloj havos ŝancon ; por feliĉa amo ; en ĉi tiu viv'? ; En ĝangala dramo ; tre malcertas kia estos fin' ; Paŝu en la danco ; Ĉu la junuloj havos ŝancon?)

'2 En ĉi loko ĉiuborde ; staris riĉa reĝkastelo; du najbaraj landoj orde, ; frate vivis sen kverelo... ; Ilin paco kune benis. Ve, Siriam, la reĝino, ; de popolo tre amata, ; kun infano en la sino ; dum akuŝo murde fata ; sen la nasko morte svenis.

'3 Sur ŝtiparo flagre flama,;
kiam ŝin jam oni metis, ; – aĥ,
miraklo! – kri' infana ; por la
vivo rajton petis ; kaj naskiĝis
– pracidino. En funebro
kia ĝojo! ; Mvajnun ŝin la
patro nomis. ; Tamburino kaj
hobojo ; dum festeno vete
sonis ; kaj abunde fluis ĝino.
.....

'4 Tamen ŝi neniam loĝis ; en
la patra reĝpalaco; al tombejo
ŝin alkroĉis ; superstiĉ' pri
vivminaco... ; Tiel diktis leĝ'
morala. Sur ŝtipara loko
ĝuste ; luksan domon oni
faris; mebloj, bildoj reĝoguste
; pruvis: patra am' ne ŝparis... ;
Eĉ estiĝis urbo Dalla.

,&2:

'5 Sur la transa riverbordo ;
kuŝis lando, la najbara, ; kies
estro, reĝa korto; sin decidis
festprepara... ; Ili gastojn cent
invitis. Tie, en la pompo
bala, ; princo Nandar, la
reĝfilo, ; ligis sin al Mvajnun
pala ; per ĵurvorta korhumilo...
; Sed ŝin poste ne plu vidis.
.....

'6 Lia patro tre rigore ; tiun
amon pense pesis, ; superstiĉe,
eĉ senkore ; ŝin renkonti
malpermesis... ; Leĝon formas
reĝa vorto. "Ĉar princino
Mvajnun bela ; el la morto-
ombro venis ; – kia fato, aĥ,
kruela! – ; per ŝi nepre plago
venis..." ; Tiel klaĉis reĝa
korto.

'7 Princo Nandar triste vagis ;
sur la bordo ĝangalrande, ;
pense – transe sin imagis, ; sin
torture, sin demande: ; "Kiel
iri al ŝi foje?" Ĝuste tiam
en trankvilo ; sub sunbrilo ja
ripozi ; kuŝis granda
krokodilo... ; (Kiu povus eĉ
supozi?! ; Ĝi haltigis lin
survoje.)

'8 "Kara mastro, mia bona, ;
kiel povus mi vin servi? ; "Aĥ,
Pluvnubo, mia bona, ; ĉu
transiri eblus per vi ; por
revidi mian karan?" Nu,
Pluvnubo (ĝia nomo) ; tuj
malfermis sian buŝon; post
minutoj sen malbono ; li
atingis herbopluŝon ;
transaborde la najbaran.

'9 "Princo Nandar, en
mallumo, ; kiam lun' sin kaŝas
nube, ; pretas mi por
revplenumo ; sendanĝere kaj
sendube". ; Jenon diris
krokodilo... Kaj de tiam
ĉiufoje, ; kiam lunon nubo
kovris, ; princo Nandar jen ĉi-
voje ; sendanĝere
transmanovris ; en sekreto, en
trankvilo.

'10 Princo Nandar nokte iris ;
kaj revenis ĉe tagiĝo;
Mvajnun bela, aĥ, sopiris ; nur
pri nokta pluvnubiĝo... ; Tiel
pasis tuta jaro. "Mvajnun,
ci, trezor' milobla, ; koromia
por ci flamas!" ; "Nandar mia,
ci, plej nobla, ; mi ĝistombe
nur cin amas!!" ; Tiel kveris
princa paro.

,&3:

'11 Ĉiu havas malkamikon, ;
eĉ Pluvnub', la krokodilo. ;
Bruna faris la intrigon, ; la
virina krokodilo. ; Ŝi ĵaluze lin
enviis. Ŝi jam iĝis, jes,
centjara; kaj mastranta sorĉo-
konon, ; per magio
venĝprepara ; el si faris –
veran homon. ; Kiel? ŝi
sekreton sciis.

'12 Ŝi fariĝis ĉambristino; la
princino tiel servis. ; Ŝi tre
ruze sen animo ; per flatvortoj
ĉiam vervis ; por sin al
Pluvnubo venĝi. "Aĥ,
princino, foje provu ; de la
princo tion peti, ; ke ripoze vi
ja povu ; vian kapon dekstren
meti. ; Amopruvo nestas en
ĝi!"

'13 Sciis la virino aĉa, ; ke ŝi
sorĉe Faton vokas ; kaj per tio,
flato plaĉa, ; akcidenton ŝi
provokas... ; Sed ŝi tion celis
ĝuste. La princino, la
naiva, ; ŝiajn vortojn bonaj
kredis ; kaj ĉe l' princo
kissoifa por deziro sia pledis, ;
kiam ŝin li prenis bruste.

'14 "Mia kara, peton havas ;
mia koro cin amanta, ; nur
peteton, sed ĝi gravas; tio
pruvos, kiagranda ; estas al mi
cia amo. Ho, permesu dum
ripozo ; dekstraflanken kapon
meti; igu min per tia pozo pri
ĝistomba amo kredi, ; kiu
flagros eĉ en flamo".

'15 "Via peto, aĥ amata, ; min
timigas... Eĉ mi tremas. ; Eble
en ĝi sorto fata; por nin plage
puni venas ; el la mondo de l'
spiritoj". Mvajnun tamen
dube, triste, ; vorte, kise lin
persvadis ; ĝis – ve! Nandar
nereziste ; al ŝi cedis, dum ŝi
flatis... ; Eĥis nun la kisoj,
rido.

,&4:

'16 Mateniĝis... Sur la bordo ;
lin Pluvnubo jam atendis, ; por
kutima transenporto; la
buŝegon disetendis, ; estis
preta tuj ekaĝi. Princo
Nandar do ekuŝis ; kiel ĉiam
tre komforte; tiu servo lin
kortuŝis, ; tial dankis li
plurvorte ; kaj komencis
revojaĝi.

'17 Sorĉa fort' de l' vort'
konsila ; tuj efikis nun dum
naĝo, ; ĉar en kapo krokodila ;
nebukiĝis ĉiu saĝo... ; Kaj ĝi
naĝis sinforĝese. Pasis
horoj, eĉ la suno ; ĝis zenito
suprenvenis; kia fato, plaga
puno!, ; princo Nandar drone
svenis, ; eĉ li mortis jam
vojmeze.

'18 Ve, Pluvnubo ekmemoris ;
pri la ŝarĝo, sia kara, ; kiam
bordon jam esploris ; la
taĉmento soldatara, ; inter ili
mem la reĝo. Nun
Pluvnubo juĝprovoke ; ĉion
plore do rakontis ; kaj sincere
mortovoke ; pri kulpego sia
hontis: ; "Juste trafu min la
leĝo!"

'19 "Vian mastron, mian filon ;
; ĉiam servis ci fidele, ; do
larmantan krokodilon ; puni
estas jam sencele" ; tion reĝo
triste diris. "Naĝu transen
do denove ; al princino, bela
Mvajnun, ; diru: Nandar
mortis, ho ve, ; por li ne plu
brilos sun'..." ; Kaj Pluvnubo
transeniris... ..

'20 La mesaĝo pri la morto ;
spiron mem de Mvajnun rabis
; kaj terura dolorforto ; ŝian
koron fende frapis, ; kaj ŝi
falas tuj mortinta. Al du
landoj la flugilojn ; tiel sternis
Mortanĝelo ; kaj tremigis
multajn milojn ; superstiĉo pri
kruelo ; de l' transtera forto
blinda.

,&5:

'21 Postan tagon en du landoj ;
du ŝtiparoj flagre flamis ; kaj
cindriĝis geamantoj, ; kiuj
revis, kiuj amis ; enmortombro
de la Fato. Dum la morno
de l' cerebro ; fumostrioj
suprenstrebis, ; alĝangalo en
funebro ; ventportata kanto
ŝvebis... ; En ĝi ploris la
kompato.

'22 Du fumstrioj milde, mole,
; alte en la ĉielbluo ; jen
kuniĝis – ĉu konsole? – ; por
postmorta ama duo ; de
senkorpaj geamantoj... ..
Poste, kiel rido ĝoja, ; tiu
fumo por rimarko ;
transformiĝis – strio voja : ;
sepkolora ĉielarko ; super du
plorantaj landoj.)

& Fablo pri gilotin-ŝraŭbeto:

< Ripete 29, 36 aŭ 50 sed rekante 29 el 65 batoj por strofo, entute 1950 paŝoj dum 21 minutoj. Verkis Nikolao Nekrasov (Sennacieca Revuo II/VI, N-ro 5 (17), febr. 1925). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,6:61> (

o;do /mimi mire dodo remi so fa a;do mimi mire dodo TiLa So So
o;do mimi mire dodo remi so fa a;fa mimi mido mimi mido mi mi
i;fa mimi mido mimi mire do do o;

(#Rekantaĵe: mi so so ofa mi re re re; re fa fa ami re do do do; mi
so so ofa mi re; re fa fa ami re do do;)

)×30)+

(& Strofoj:

'1 /Sonante per terura muĝa
knaro, ; Tranĉante sen ripozo
kaj sen laco, ; Ĝi staris en la
mezo de la placo, (; Kaj ĉirkaŭ
ĝi amasis urbanaro.)×

(×: **Kupro brilas en la bloko
; fiksa kiel forta roko ;
Kokerikas koko ; Kupro
brilas en la blok'.**)

'2 (Po unu kun videblaj tim-
esprimoj ;)× (Alvenigataj estis
la viktimoj. ;)×3

'3 Jen unu preĝis, jen alia
ploris, ; Jen tiu estis malbenita
akre, ; Sed same, mortigante
buĉ-masakre, (; La gilotino
siblis kaj stertoris.)×

'4 Per malfaci[le ruli]ĝanta
ĉenobloko ; Levanta supren
estis la tranĉilo ; Kaj jen
subite de la streĉobloko (;
Abrupte ĝi faladis kun
ekbrilo.)×

'5 En la amaso tra la placo tuta
; En la fatal-momento
ekzekuta ; Ekkrio – "ha!" –
trakuris iufoje ; Kaj en mistero
de silento muta ; Jen iu orfe
ĝemis plej malĝoje?

'6 Simile al melonoj rikoltitaj ;
En korto kuŝis kapoj
fortranĉitaj ; Kaj sub la suno,
radianta ride, ; Indiferentaj,
stultaj kaj malspritaj ; Sur ili
muŝoj rampis sang-avide.

'7 Kaj same, ankaŭ sub la suno
supra, ; Brilante per ole-
ŝmirita spino, ; Plej gaje sidis
eta ŝraŭbo kupra (; ĉe iu bloko
de la gilotino.)×

'8 Pri tuta mondo ĝi nenion
sciis, ; Ĝi estis bona, bela kaj
afabla ; Kun maniero milda
kaj agrabla ; Sur sia loko lerte
ĝi funkciis ; Kaj pri funkcio
sia ne konsciis.

'9 Tre ofte, kiam la ŝraŭbeto
bloka ; Kapricis kaj obstinis
iel sprite, ; Ne plu laboris la
tenilo hoka ; Kaj lasis la
tranĉilo kvazaŭ moka ; Eĉ ies
kapon nur duontranĉite.

'10 Ekzekutisto devis tiukaze ;
Ekgrimpi al la ŝraŭbo por
riparo ; Kaj li klopodis tie plej
emfaze (; Konvinki ĝin pri
urĝo de refaro.)×

'11 Kaj la ŝraŭbeto jam en
bon-humoro ; Konsentis
petoleme pri laboro – ; Kaj ree
fluis sango agonia, (; Kaj regis
la arbitro tirania.)×

'12 Okazis tamen unu belan
tagon: ; Ekestis en la urbo
tumultego, ; Sur placo oni
levis ruĝan flagon, (; Kaj
proklamita estis nova rego. ;)×
.....

'13 (Kaj tut-simile, kiel ĵus pli
frue ;)× (Verŝata estis sango
larĝaflue, ;)×3

'14 Torento da popol-amaso
granda ; Disverŝis sin tra la
liberaj stratoj, ; Kaj kun
standardoj ruĝaj kaj plakatoj (;
Ĝi fluis kiel strio
larĝrubanda.)×

'15 Ŝanĝiĝis nun la ordonista
rolo: ; Komunavole sen
diskuto ; Al la tiranoj venĝis
la popolo (; Per gilotina
ekzekuto.)×

'16 (La ŝraŭbo, kiun konis ni
antaŭe, ;)× (Hodiaŭ agis
hieraŭe: ;)×3

'17 Sen scio pri la diferencoj
rangaj ; Estante mem nur ero
de detaloj, ; Ĝi partoprenis en
ekstermoj sangaj ; De la
antaŭaj moŝtoj longalangaj: ;
Nobelaj, mastroj, reĝoj,
generaloj.

'18 Sed kiam la popol-koleron
pravan ; Finfine anstata[ŭis
indul]gemo justa, ; La ŝraŭbo
ekrimarkis, ke jam rusta (;
Makulo kovras ĝian brilon
ravan:)×

'19 (Ne plu bezona pro terorero – ;)× (La gilotino staris sen laboro! ;)×3

"20 Kaj iutage, dum popola festo, ; Simbole pri malnovo, kiu pasis, ; Publike kun solena manifesto ; Ĝin la popolo disfrakasis ; Kaj ie kuŝi en polvaĉo lasis.

'21 Per sola frapo trafa kaj subita ; Ŝraŭbeto nia estis forskuita, ; Kaj ofendi[te pri ĉi] tia malafablo ; Ĝi multe plendis pri la sta[to neme]rita ; Kaj longe kuŝis en malpura sablo –

'22 Ĝis iu laborista helpobubo ; Okaze ĝin retrovis en la rubo, ; Ĝin alte suprenĵetis kaj rekaptis, (; Purigi ĝin per forta froto provis,)×

'23 Kaj poste – jam sur muelej-maŝino ; Aŭ sur alia bona instrumento ; Ŝraŭbeto mia sidis kun kontento, (; Samkiel sur la fama gilotino.)×

'24 (Ĉe iu transmisio aŭ ĉe bloko ;)× (Perfekte ĝusta estis nova loko. ;)×3

"25 Kaj same – sub la suno bril-radia, ; Ole-ŝmirita zorge per ŝmirilo, ; Funkciis tute taŭge ŝraŭbo nia, ; Sed jam ne por buĉado tirania, ; Sed jam por la komuna bon-utilo.

'26 Ho, vi, ŝraŭbetoj, multaj sen difino, ; Partetoj de giganta mekanismo, ; Nomata – "la kapitalismo", (; Terura kaj fatala gilotino!)×

'27 Vi, ĉiuj, en la mondo ĉiu subsuna, ; Laŭ via eksteraĵo – bel-aspektaj, ; Laŭ la esenco – bonaj, eĉ perfektaj, (; Pri vi ja temas en fabelo nuna.)×

'28 Ho kiom mi vin ŝatas plej bonvole, ; Se sidas vi sur la alia loko, ; Sed servas vi al premo kaj sufoko, (; Eĉ – kvankam senkonscie kaj senvole.)×

'29 Eĉ sendepende de kvalitoj viaj, ; Reĝimon maljustegan vi subtenas ; Kaj tial do per ĉiuj fibroj miaj (; Mi vin malamas kaj malbenas.)×

'30 Sed kiom ĝoje mi renkonti povus ; Vin en alia pli feliĉa horo: ; Ja ĉiuj taŭg-utilan lokon trovus (; En nova regno – Regno de Laboro.)×

& La plej granda kulpulo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 1972 paŝoj dum 20 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) inspirab norvega melodio ŝotisa, verkante novan rekantaĵon, ripetub kelkaj versoj kaj modifante vicordon de aliaj. Vicordon modifitan havas strofoj &M kaj originalan havas &O. Baladestro elektu mem. Strofo &M'62 duoblas.>

(#Melodio:

<1,7:29>

(/La dore mi mi milre falre mi do; do redo dodo doLa do Ti;

(#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a)

)×68)+

(&Strofoj:

(&M: '1 /Kiel sub Trojo la2 a2rgivojn ; per sagoj, estingante multajn vivojn,

(×:; **Venu mastrino en la2 ĉen' ; Prenu mian manon en firma ten'.**)

'2 Apollo kolerante pafis ; tiel la bestojn foje trafis) ?

(&O: '1 /Kiel sub Trojo la2 a2rgivojn ; Apollo kolerante pafis

(×:; **Venu mastrino en la2 ĉen' ; Prenu mian manon en firma ten'.**)

'2 per sagoj, estingante multajn vivojn, ; tiel la bestojn foje trafis)

'3 amasa mort' per plago fata ; pro la koler' de dio nekonata.

(&M: '4 Kunvokis la leono la palavron ; kaj diris: "Ĉie vidas vi kadavron,

'5 Rigardu, ho regatoj! Mia korto! ; rigardu, la popolon falĉas morto.) ?

(&O: '4 Kunvokis la leono la palavron ; kaj diris: "Ho regatoj! Mia korto!

'5 *Rigardu, ĉie vidas vi kadavron, ; rigardu, la popolon falĉas morto.)*

'6 Nin certe dio punas per ĉi plago ; pro ies krima ago.

'7 Ni serĉu lin, kaj mortu tiu unu, ; ke l' dio senkulpulojn plu ne punu!

'8 Tial kunvokis mi la konferencon, ; ke ĉiu sian konsciencon

'9 esploru, kaj konfesu devkonscie, ; se ion kulpis li malpie.

'10 Kaj, ĉar falema estas ĉiu besto, ; eĉ mi mem, malgraŭ mia reĝmajesto,

(&M: '11 jen, mi komencas mian kulpo-liston: ; Mi manĝis multajn ŝafojn, eĉ paŝtiston,

'12 Mi manĝis multajn ŝafojn, mi ne negas, ; kelkfoje eĉ paŝtiston, mi ne negas,) ?

(&O: '11 jen, mi komencas mian kulpo-liston: ; Mi manĝis multajn ŝafojn, mi ne negas,

'12 *Mi manĝis multajn ŝafojn, mi ne negas, ; kelkfoje eĉ paŝtiston,)*

'13 kaj poste: Mi kelkfoje koleregas; eĉ tio povas esti, ke mi regas

'14 iom rigore, eĉ se juste. ; Nu, ĉion, kion havis mi surbruste,

'15 mi diris rekte, diris sen ekskuzo, ; kvankam okazis ja, ke muso

'16 sub miajn ungojn foje venis, ; kaj, ĉar stomako mia ĝuste plenis,

'17 mi la besteton, petegantan time, ; forkuri lasis grandanime.

'18 Vi scias, poste tiu ĉi museto, ; por liberigi min el reto,

'19 la maŝojn el dankem' tramaĉis. ; Al mia reĝa koro vere plaĉis,

'20 ke tiel amas min la modestuloj... ; Do, konfesinte laŭ la postuloj,

'21 nun mi atendas, juĝu min severe! ; Volonte mi dediĉos min ofere

'22 por vi, popol' amata, do decidu! ; Aŭ eble ni laŭvice vidu

'23 (ĉies kulpliston, ĉar prefere ;)×

'24 mortu farinto de l' plej granda kulpo." ; Paroli nun anoncis sin la vulpo:

- '25 "Ho, nia reĝa moŝto, ĉu vi degnas ; tiel paroli? Vi plej juste regnas,
- '26 kaj estas de skrupuloj turmentata ; nur tial, ĉar tro delikata
- '27 estas animo via. Ĉu vi pekas ; manĝante tiujn ŝafojn, kiuj blekas
- '28 netolereble? De ilia flanko ; koncernas vin eĉ danko,
- (&M: '29 ke ilin vi honoras per devoro! ; Kaj la paŝtisto! Jen teroro,
- '30 tiran' reganta bestojn tiu estas, ; pro ties manĝ' neniu ja protestas!) ?
- (&O: '29 ke ilin vi honoras per devoro! ; Kaj la paŝtisto! Tiu estas
- '30 tiran' reganta bestojn per teroro, ; pro ties manĝ' neniu ja protestas!) ?
- '31 Sed tiu mus'! Bonfaro de l' bonfaroj! ; Fablistoj tion gloros dum centjaroj!"
- '32 Tiel la vulpo. Tondre ekaplaŭdis ; flatistoj. Oni laŭdis
- '33 la reĝon pro l' noblega sentimento, ; kaj eĉ la vulpon pro la elokvento.
- '34 (Nu, la ruzulo tion aŭdis ;)×
- '35 kun granda ĝojo kaj kontento: ; Pretertiriĝis tiel la atento
- '36 pri lia propra kulpo kaj malico. ; Li haste kaŝis sin en lasta vico.
- '37 La urso diris nun kun ĝema voĉo: ; "Min mordas konscienciproĉo.
- '38 Kun homo longe mi amikis, ; la tagojn, noktojn kune ni pasigis,
- '39 (komuna estis nia manĝo, loĝo. ;)×
- '40 Li dormis foje, sidis mi apude, ; kaj vidis, ke altrude
- '41 sidiĝis al li sur la buŝo ; impertinenta muŝo.
- (&M: '42 Por gardi lian dormon mi forpelis ; tiun ĝenulon. Nun ekŝvelis
- '43 mia kolero, ĉar l' estaĵ' aroga ; reflugis ĉiam, kaj per peco roka
- (.....) ?
- (&O: '42 Por gardi lian dormon mi forpelis ; tiun ĝenulon, sed l' estaĵ' aroga
- '43 reflugis ĉiam. Nun ekŝvelis ; mia kolero, kaj per peco roka

'44 mi murdis ĝin, sed ankaŭ kapo ; amika frakasiĝis per la frapo.

'45 Jen mia kulp' kaj mia malfeliĉo! ; Ĉar ve, krom la doloro pro l' perdiĝo

'46 de la amiko, ĉiuloke, ; ĉiuepoke

'47 (oni diradas pri mi moke, ;)×

'48 ke estas mi amiko stulta, ; ol kiu estas de valor' pli multa

'49 la saĝa malamik'. Mi homon ; amatan perdis, kaj renomon!"

(&M: '50 La povra urs' amare ploris, ploris, ; oni aliajn kulpojn ne esploris,

'51 ĉiuj rigardis lin komplete, ; li do tranaĝis glate.) ?

(&O: '50 La povra urs' amare ploris, ploris, ; ĉiuj rigardis lin komplete,

'51 aliajn kulpojn ne esploris, ; li do tranaĝis glate.)

'52 Sekvis la tigro. Li de l' lipoj lekis ; la sangon (ĵus li manĝis) kaj ekblekis:

(&M: '53 "Kiu akuzos?" Brilis dentoj blankaj, ; kaj mutis ĉiuj, spiromankaj.

'54 L' okuloj verde fosforeskis. ; Lia demando sen respondo restis.) ?

(&O: '53 "Kiu akuzos?" Brilis dentoj blankaj, ; l' okuloj verde fosforeskis.

'54 Kaj mutis ĉiuj, spiromankaj. ; Lia demando sen respondo restis.)

(&M: '55 Pantero, linko, sovaĝbestoj pluraj ; prezentis sin, sed senriproĉe puraj

'56 ĉe ili same koro kaj lieno ; pruviĝis. Kaj sin savis per mieno) ?

(&O: '55 Pantero, linko, sovaĝbestoj pluraj ; prezentis sin, sed koro kaj lieno

'56 ĉe ili same senriproĉe puraj ; pruviĝis. Kaj sin savis per mieno

'57 Kaj sin savis per mieno ; humila ankaŭ la hieno.

'58 La vico de l' azeno tiam venis, ; kiu sin jene ekzamenis:

('59 "Mi kulpis foje, mi bedaŭras pente, ; la freŝa herbo logis tente,) ?

(&O: '59 ("Mi kulpis foje, mi bedaŭras pente, ;)×

'60 ho ve, ke tio okazis. ; Iam mi preter Delfoj pasis,

'61 malsatis jam turmente, ; la
freŝa herbo logis tente,

(&M: '62a kaj jen, mi min
delogi lasis: ; ho ve, ke tio
okazis.

'62b Mi malsatis jam
turmente, ; herbkvastojn
kelkajn manĝis, senatente,
.....) ?

(&O: '62 kaj jen, mi min
delogi lasis: ; *Herbkvastojn
kelkajn manĝis, senatente,
.....*)

'63 ke rajton mi ne havis ja
por tio." ; La lup' leviĝis kun
indigna krio:

'64 "Ho, ĉu do iam kulpon pli
punendan ; vi aŭdis? Manĝi
herbon fremdan!

'65 Kaj eĉ, en Delfoj! Eble la
herbkvastoj ; estis plej propra
hav' de l' sanktaj pastroj!

(&M: '66 Por tia krimo, fratoj,
puno sola ; ekzistas: mort'! kaj
en kolero bola,

'67 la dio inter nin la plagon
sendis!" ; Jen do, pro kio la
azeno pendis.) ?

(&O: '66 *Jen do, pro kiu, en
kolero bola, ; la dio inter nin
la plagon sendis!*

'67 *Por tia krimo, fratoj, puno
sola ; ekzistas: mort'!" — Kaj
la azeno pendis.*))